# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

n-ro 7
novembro 1986


ATENTINDAĴOJ
------------

SEKVE AL DEZIRO ESPRIMITA EN LA ĜENERALA KUNSIDO DE LA 18-A DE OKTOBRO EN ANTVERPENO, FEL INTENCAS ORGANIZI EN PROKSIMA ESTONTO :

- STUDOTAGON POR INSTRUANTOJ CELE AL PRIDISKUTADO DE SPECIFAJ DEMANDOJ GRAMATIKAJ KAJ DE LA MANIERO PLEJ BONE TRANSIGI LA EKSPLIKOJN AL LA LERNANTOJ (METODIKO/DIDAKTIKO)

- RE-ORGANIZI LA SERION DE KADROKURSOJ KIUJ JAM OKAZIS EN 1981/82 PRI I.A. PUBLIKA PAROLADO, KUNVENTEKNIKOJ, HISTORIO ĜENERAL-MOVADA KAJ PLI SPECIALE PRI ESPERANTO EN FLANDRIO, LITERATURO, PROPAGANDO KTP.

KOMPRENEBLE IO TIA ESTAS EBLA NUR SE ESTOS SUFIĈE DA INTERESO. TIAL NI PETAS AL TIUJ, KIUJ INTERESIĜAS PRI LA EFRO, JAM ANONCI SIN AL LA SEKRETARIO P/A ESPERANTOCENTRO EN ANTVERPENO.

NIAJ ADMINISTRANTOJ ANKAŬ BONVOLE NOTU KE JE 18 11 1986 OKAZOS EN BRUSELO LA ĈIUJARA ĜENERALA KUNDISO DE BELGA ESPERANTO-FEDERACIO.

FEL-ESTRARANOJ BONVOLE NOTU LA VENONTAN ESTRARKUNSIDON JE SABATO 15-A DE NOVEMBRO EKDE 08.30 H.

**Informilo,** kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. • Jarabono: 150 fr. • Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 • Respondeca eldonanto (*verantwoordelijke uitgever*): Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel.

## E S T R A R O kaj L A B O R G R U P O J

1. KUNORDIGADO : Ivo DURWAEL (prezidanto) 03/440 30 92
   Paul Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM

   Jan BOVENDEERD (sekretario)
   Meidoorn 42/2, 2510 MORTSEL

2. FINANCOJ K. ADMINISTRADO (+ turismo + "taksi stop" + eldonoj)
   Erik D'HONDT (estrarano) 053/77 4
   Wilgstraat 25A, 9440 EREMBODEGEM

   Paul PEERAERTS (direktoro) 03/234 34 00
   Baron Dhanislaan 13, 2000 ANTWERPEN
   Roland ROTSAERT ( estrarano) 050/33 00 04
   Visspaanstraar 97, 8000 BRUGGE
   050/33 00 04

   Christian DECLERCK (kom. pri literaturo/eldonoj)
   Amerikalei 135/2, 2000 ANTWERPEN

3. INFORMADO GAZETARA SERVO
   Edward SYMOENS (estrarano) 03/666 62 66
   Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT

   Herman DECEUNINCK (kom. gazetara servo) 02/360 17 22
   Villalaan 1 b.4, 1500 HALLE

4. INSTRUADO - PROPAGANDO - EKSPOZICIOJ - KONGRESOJ

   Marc VAN DEN BEMPT 016/20 14 53
   Duisburgsestraat 12, 3030 LEUVEN-HEVE

   Albert CLAESEN 011/32 36 03
   Zonnebloemstraat 7, 3610 DIEPENBEEK

   Ray GERARD
   Antwerpsesteenweg 24, 2250 BROECHEM

5. GRUPA AGADO Hilde VANINGELGEM-VANDRIESSCHE (estrarano) 053/70 50 11
   Arbeidstraat 21, 9300 AALST

   Trees DOOMS (prelegvojaĝoj) vidu P. Peeraerts

   Jules VERSTRAETEN ( OMBUDSMAN) 03/827 66 43
   St. Bernardsesteenweg 1078, 2710 HOBOKEN

   Rilatoj kun FLEJA : Hilde VANINGELGEM.



## P R O T O K O L O

pri la estrark-nsido de sabato 18-a de oktobro 1986 en Antverpeno.

Ĉeestis : Erik D'HONDT (ER), Ivo DURWAEL (ID), Paul PEERAERTS (PP), Roland ROTSAERT (RR), Kiki TYTGAT (KT), Hilde VANINGELGEM (HV), Jules VERSTRAETEN (JV) kaj Jan BOVENDEERD (JB)

Petis senkulpigon : Edward SYMOENS (ES)

Prezidis : ID

Protokolis : JB

Komenca horo : 08.30 h.

### T A G O R D O

1. Protokolo pri la antaŭa estrarkunsido

   Punkto 11 : Kotizo, 2-a alineo legu anstataŭ "proponite" : decidite
   Por la cetero ĝi estas aprobita.

2. FINANCOJ

2.1. Ĝenerale : la situacio estas sana.

2.2. LA VERDA STELO volas disponigi sian fondaĵon por Informado al FEL. Kompense FEL liveros al LVS la necesan propagandmaterialon senpage.

2.3. Eldonoj :
- KIA MIKSAĴOJ baldaŭ aperos.
- La verko de Waringhien nun estas provlegata kaj povos aperi verŝajne fine de la jaro.

2.4. Libroservo

2.4.1. Cyriel BUYSSE kontrolis la librostokon, tiel ke nun ĝi estas en ordo.

2.4.2. LIBROVERMETO : ED ne plu havas la tempon por sin okupi pri ĝi. Anstataŭe PP proponas meti regule kvarpaĝan folion en ESPERANTO PANORAMA, io kio ebligos al ĉiu kiu volas kunmeti katalogeton pri la verkoj en nia stoko.
Aprobite.

2.4.3. RR proponas organizi montrofenestron en la kel-etaĝo por la plej interesaj libroj.
Aprobite. Ni serĉos fakulon por aranĝi tion.

3. ADMINISTRADO

3.1. La membraro kreskis je 11 %

3.2. El Kortrijk venis peto por disponigi membrolistojn en regulaj momentoj

por ekkoni la novajn membrojn, ĉefe tiujn kiuj pagis, ĉu rekte al FEL, ĉu al alia grupo.

Ĉar jam ekzistas por ĉiu grupo eblecon peti liston de la membroj el sia regiono, ni opinias ke ne necesas doni sekvon al tiu peto.

Kontraŭpropono estas disponigi membrolistojn okaze de la ĝenerala kunsido de oktobro.

Alia propono estas sendi al la grupoj liston de informpetintoj el ilia regiono. Tio eblos pere de speciala kodo metita sur la informkartoj kiuj akompanas la informfaldfoliojn.

4. TURUSIMO

ED ankoraŭ ne havas informojn de VTB/VAB.

KT planas organizi grup-vojaĝon aŭtobusan. Temas pri du-semajna vojaĝo ekde 16-a de julio kies unua parto estos al KRAKOVO, kie okazos la IJK por poste partopreni la UK en Varsovio.

Ŝi jam kontaktis diversajn oficialajn instancojn kaj opinias povi aranĝi la necesajn intervenojn por enordigi la problemojn de Vizoj k.s.

KT preparos informbultenon kaj pretas ankaŭ prizorgi informvesperon se neceso estos.

5. INFORMADO

5.1. Patrona Komitato.

5.1.1. ES sendis leteron al la reĝo nome de UEA, ĉar temas ja pri INTERNACIA PATRONA KOMITATO. Sed kio pri NACIA PK ?

JB kontaktiĝos kun ES por peti la tekston kiun li preparis kaj por interkonsenti pri la personoj al kiu sendi ĝin. Ni prizorgu la Flandran parton de la lando.

5.2.2. Okaze de la ĝenerala jarkunsido de BEF je 08 11 1986 en Bruselo, ni priparolos la kunmetadon de Nacia Patrona Komitato tut-landskale.

6. INSTRUADO

Leviĝas la demando ĉu reorganizi la serion da kadrokursoj kiu jam okazis en 1981 kaj 1982.

Principe jes. Ni petu la ĝeneralan kunsidon.

Rilate al kadrokurso por instruontoj la ĝenerala opinio estas pli nea ol jesa. Ni vidu en la ĝenerala kunsido posttagmeza.

7. DIVERSAJOJ

7.1. JB preparis aktivecraporton por la ĝenerala kunsido de BEF.

Post legado kaj korektado de kelkaj eretoj, ĝi estas aprobita.



7.2. Ĉefdelegito de UEA.

Pro la fropaso de F-ino ORSOLINI, la posteno de ĉefdelegito en Belgio vakas.

Ni petos en la ĝenerala kunsido kandidato(j)n.

7.3. Kongreso BLANKENBERGE.

La kongreso en Blankenberge saldiĝis per tre interesa profita saldo.

7.4. Gazetara konferenco.

ID intencis organizi gazetaran konferencon en oktobro. Tamen, ĉar estas multe da ŝancoj ke en la estonta libroborso - kie estas tre interesa stando pri Esperanto - svarmas ĵurnalistoj, kiuj verŝajne de mem informiĝos pri Esperanto. Se tiel estos ne necesas mem organizi gazetaran konferencon. Se tio ne realiĝos, ankoraŭ estos tempo kaj okazo por mem organizi ĝin.

Ni do prokrastu tion.

7.5. Preparo de la posttagmeza ĝenerala kunsido.

La kunsido okazu laŭ jena skemo :

- la nova FEL-stilo (prezento)
- Turismo
- Kotizoj kaj abonprezoj
- Listoj de informpetantoj
- Jubileaj manifestacioj
- Kadrokursoj
- Ĉefdelegito de UEA
- Diversaĵoj.

Fino de la kunsido : 12.15 h.

# P R O T O K O L O

pri la ĝenerala kunsido de FEL je sabato 18-a de oktobro 1986 en A'pen

Prezidas : ID

Protokolas : JB

Komenca horo : 14.00 h.

## T A G O R D O

1. TURISMO : Pro specilala peto de K. Tytgat, traktiĝas antaŭe le de ŝi pritraktota temo :

Vojaĝo al Pollando okaze de la venonta jubilea UK en Varsovio

Laŭ indikoj ricevitaj, Monda Turismo organizos 15-personan grupvojaĝon por ĉiuj personoj, kiuj ne estas tro postulemaj rilate al komforto aŭ lukso. La de KT planata vojaĝo celas tiun grupon, kiu jes estas iel postulema en tiu rilato.

Kiel en la estrar-kunsido, KT proponas 2-semajnan vojaĝon aŭtobusan, antaŭe al Krakovo, poste al Varsovio. Dum la unua periodo tiuj, kiuj ne intencas partopreni la IJK (Internacia Junuala Kongreso)-n, povos plenigi sian tempon ekskursante aŭ turismumante, ĉar la regiono estas ege bela.

Plie, ĉar por grupa aliĝo al la UK, UEA donas interesan rabaton, KT konsilas prokrasti la aliĝon al la kongreso, ĝis kiam ŝi disponas pri pli da detaloj. KT nome sin okupos pri la necesaj administraj taskoj rilate al vizoj k.s.

KT intencas prepari informilon por proksima novembro kaj ankaŭ pretas gvidi informkunvenon pri la temo.

Laŭ KT eblos al tiuj personoj, kiuj ne povos partopreni la ir-vojaĝon, tamen partopreni la reven-vojaĝon. Sed tio devas esti sciigita antaŭ la foriro.

2. Nova FEL-STILO

Kiel jam sciigite antaŭe, FEL en kunlaboro kun la laborgrupo pri propagando, informado ktp. kaj kun kelkaj profesiaj entreprenoj, preparis novan stilon surbaze de la nova jubilea emblemo kaj aperigis tion sur la leterpaperoj, faldfolioj, broŝuroj, kursolibroj, nu sur ĉio, per kio FEL aperas antaŭ la publiko.

Por ke ĉio kio koncernas Esperanto-aspektu ĉie la sama tra tuta



Flandrio, ĉiuj grupoj estas petataj uzi la saman prezenton kaj por kuraĝigi ilin forigi la ekzistantan materialon kaj anstataŭi ĝin per la nova, FEL proponas jenon :

- leterpapero : ĉiu grupo ricevos 50 foliojn + 50 kovertojn senpage.
- faldfolioj (novaj) je po 1 BF
- informaj folioj (pli ampleksaj) : je po 2 BF.
- ESPERANTO-dokumentoj ( en nova vesto) je po inter 12 kaj 29 BF.

La grupoj jam estis invititaj (vd antaŭa INFROMIMO-n) havigi al ni la donitaĵojn, kiujn ili volas aperigi sur sia paperon kaj aliajn dokumentojn. Mortsel kaj LA VERDA STELO jam faris kaj do eblis montri la rezultaton. Tiu ĉi estas ege aprezata de la tuta ĉeestantaro, kaj do ĉiu senprobleme akceptas la proponon de la estraro.

3. Lernolibro ESPERANTO PROGRAMITA.

La kursolibro estas reverkita kaj aperas nun en unu sola volumo, ankaŭ en nova vesto komprenebla.
" 't Spectrum " disponigas la kursojn al la ĝeneralaj librovendejoj kaj tial jam aĉetis 250 ekzemplerojn. Ĝi same estos prezentata al la publiko okaze de la venonta libroborso en Antverpeno.

La prezoj : la kompleta kurso, konsistanta el la kursolibro + kasedo + vortaro (Prisma) kostos 1495 BF.

- la libro sola 800 BF
- libro + kasedo : 995 BF
- kasedo sola : 200 BF

4. Kotizoj kaj Abon-prezoj.

Por eviti miskomprenojn la estraro decidis ne ŝanĝi la kotizojn, sed adapti la abonprezojn por ESPERANTO PANORAMA. Ambaŭ kostos ekde nun same 200 BF.
Se pagitaj antaŭ 15 12 1986, ili donos rabaton de 80 BF je aĉeto de libro aŭ broŝuro el la listo sur la aliĝilo.
La kasistoj estas petataj atenti pri ĝustatempa ensendo de la aliĝiloj.

Por transpagi la kotizojn k.s. la kasistoj estas petataj atendi la fakturon de la centro.

5. Listoj de informpetantoj.

Decidite estas sendi regule liston de informpetintoj al la diversaj grupoj el kies regiono ni ricevis tiujn petojn, kaj kompletan liston okaze de la oktobra ĝenerala kunsido.

6. JUBILEA JARO

Krom la unutaga organizaĵo, organizos specialan programon : Brugge kaj Leuven.

7. KADROKURSOJ

7.1. Studotago por instruantoj : post diskutado la antaŭe planita kursotago por instruontoj estas anstataŭita de studotago por instruantoj. La celo estas ebligi al kursgvidantoj pri-diskuti certajn problemojn rilate al la gramatiko kaj la metodiko/didaktiko.
JB estas komisiita kontakti unue S-rojn C. Declerck , por la gramatika parto, kaj E. Van Damme por la demandoj pri metodiko kaj didaktiko kaj poste organizi studotagon. La invito aperos en INFORMILO.

7.2. Leviĝas ankaŭ la demando, ĉu denove organizi la serion da kursotagoj (aŭ parton) kiu jam okazis antaŭ kvino da jaroj (1981 / 82 )
Ĉiu konsentas.
JB sin okupos pri la organizado en la jaro 1987.
Informoj aperos en INFORMILO

7.3. La studo-tago pri Transakcia Ananlizo estas prokrastita pro tro malmultnombra interesiĝo.

8. ĈEFDELEGITO DE UEA.

Ĉar la estraro opinias ke la posteno de ĉefdelegito devas esti plenumita de persono kiu havas nenian rilaton kun estrara tasko aŭ kun entrepreno aŭ organizo (eldonejo - libroronde - libroservo k.s.) - kio estas post klarigo unuanime aprobita de la ĉeestantaro, FEL ne proponas kandidaton el la estraro. Tial la estraro alvokas al kandidatiĝo.
Sin prezentas Georgette Wybouw (edz. ALberto) el Aartrijke.

9. Patronado de grupo el Rŭando (vidu la kongresan protokolon)

Paco kaj Justeco el Bruĝo akceptas la patronadon.

10. Kongreso en Blankenberge.

Ĉar la kongreso finis kun tre interesa profita saldo, la ĉeestantaj organizintoj estas laŭde aplaŭdataj.

11. DIVERSAĴOJ

11.1. Por 1988 sin prezentis antaŭe Antverpeno. Tamen, pro la fakto ke la Genta LA PROGRESO jam havas interesajn kondiĉojn (antaŭvideblajn), por 1988 akceptas organizi kongreson LA PROGRESO.
Antverpeno do sekvos en 1990 .

11.2. Katalogo pri Esperantoverkoj en Flandraj bibliotekoj :
estas en preparo. Ĝi verŝajne estos preta en 1987.
S-roj Vanbiervliet kaj Hanssen el Kortrijk petas tamen ne finprepari ĝin antaŭ ol esti ricevinte la aldonojn kiujn ili liveros.

11.3. Je 21.03.1987 Paco kaj Justeco festos sian 50-jaran ekziston.